

# Provenca Esperanto-Federacio

kvaronjara gazeto  
**132**  
printempo 2023



leĝa depono ĉe BNF: ISSN 2609-5203

## federacia retejo

<http://www.esperanto-provence.org>

## nia federacio sur Facebook

[http://www.facebook.com/  
esperantoprovence](http://www.facebook.com/esperantoprovence)

## prezidanto

Pierre Oliva  
Eden Park n° 99  
2772 Montée du Vieux Camp  
83330 Le Castellet  
06 76 55 57 23  
nlpolecamp@gmail.com

## aliĝkoto (kun la gazeto)

6 €

> per ĉeko al: "Espéranto-Provence"  
pere de via loka asocio  
aŭ sendota al la kasisto N. Lafitte  
(ĉe la supra adreso de Pierre Oliva)  
>aŭ per bankĝiro  
(petu la bankinformojn ĉe la sekretario)

## sekretario

### redaktoro kaj enpaĝiganto

Pascal Vilain  
48 avenue Alexis Godillot  
83400 Hyères  
06 42 19 68 51  
pascalvilain83@gmail.com

## limdato por sendo de

**publikotaĵoj por la venonta n°  
25-a de junio 2023**

bonvolu sendi al la supra retadreso

><><

antaŭdankojn pro viaj kontribuajtoj

## Vorto de la prezidanto

Ĉiumatene, mi piedpromenas tra arbaro proksime de mia hejmo. Hodiaŭ, surprize - ĉu pro la ĵus reveninta printempo - mi multe pli ol kutime aŭdis birdajn pepadojn. Ŝajnis al mi, ke ili diris diverstone: «Foriru, aĉa kovimo!». Plaĉis al mi tion aŭdi! Evidente, se prave aŭguras la birdokantoj pli optimisman estontecon, ankaŭ mi fidas pri pli esperplena futuro rilate la vivon de niaj movado kaj kluboj. Cetere, agrable komenciĝis la jaro 2023 en nia Provenca regiono per sukcesa kultura semajnfino en La Garde, kaj per same kontentiga Mediteranea Esperanto-Semajno en Les Issambres. Ĉi tiu staĝo, spite la organizrezignon de la teamo, kiu efikege zorgis pri ĝi dum multaj jaroj, espereble plu okazos danke al alia skipo, kiu pretas ĝin vivigi, nome de nia federacio. Ni antaŭĝojas plu akcepti aliregionajn kaj alilandajn gesamideanojn en nia regiono! Riĉan kaj vigan movadvivon mi esperplene atendas!

*Pierre Oliva*



## enhavo

2	> federacia membro-kunveno	6	> Mediteranea Esperanto-Semajno
3	> Kultura Semajnfino en La Garde	7	> ontaj eventoj > nekrologo
4	> el la provencaj asocioj	8	> agendo
		+	> reta suplemento raporto pri MES de Liba Gabalda

---

## Ĉu vi jam pagis vian aliĝkotizon por la jaro 2023 - 6 € - al Esperanto-Provence ?

Se jes, koran dankon!

Se ne, tion vi povas fari ĉu pere de via loka asocio, ĉu rekte al nia kasisto, Nicole Lafitte, per bankĉeko aŭ per ĝiro al la federacia bankkonto.

Atentu! Sur la aliĝilo sendita kun la vintra numero 131, estis eraro en la donita IBAN. Jen la taŭga:  
Assoc. Esperanto-Provence - CA Le Beausset - FR76 1910 6000 2143 5079 3770 668

**Tio ne koncernas la membrojn de Esperanto-Marseille,  
kiuj pagas komunan kotizon al Esperanto-France (samtempan aliĝon al la asocioj landa kaj urba)**

---

## Federacia agado

### Federacia membro-kunveno

Ĝi okazis dimanĉon la 26-an de februaro 2023 en Les Issambres (Var), kadre de la Mediteranea Esperanto-Semajno.

Ĉeestis 19 membroj kaj 9 sendis sian rajtigilon. Do entute 28 membroj el la 91, kiuj aliĝis al nia federacio en 2022.



Post legado de la raportoj morala, agada kaj financa (kiujn vi povis legi en la numero 131 de nia gazeto), diskutparto estis dediĉita al la projektoj por la nuna kaj sekva jaroj.

Jen la plej gravaj:

#### - kultura semajnfino

Estis proponita denove okazigi ĝin en Domaine de Massacan, en La Garde, la lastan semajnfino de novembro. Ĝi do okazos, laŭeble, la 25-an kaj 26-an de novembro 2023.



#### - MES (Mediteranea Esperanto-Semajno)

La grupo de Saint-Raphaël sciigis, ke ĝi ne plu organizos ĝin ekde la venonta jaro.

La federacio pretas repreni la torĉon.

Estis decidite okazigi prian kunvenon por pridiskuti la eblecon plu vivi la staĝon, kondiĉe ke estos volontuloj por trovo de kursgvidantoj, preparo de la programo, zorgado pri aliĝoj kaj monaferoj, informado, akcepto kaj kafumado, ktp.

Pria kunveno estis organizita mardon la 28-an de marto. Vi tre verŝajne ekscios pli en la venontaj gazetnumeroj.

#### - EsKu

La nun konata Jutuba kanalo plu proponos novajn filmetojn laŭ sia regula duonmonata ritmo.

Ili estas videblaj ĉi tie:

<https://www.youtube.com/@EskuEsperantoKulturo>

Fine estis pritraktitaj kelkaj aliaj punktoj:

- Alain Rémy estis elektita kiel membro de la federacia komitato.

- Jean-François Cousineau pretas savi sonkasedojn pri Esperantaj kanzonoj reregistrante ilin per modernaj iloj. Se vi volas disponigi kelkajn al li, bonvolu kontakti lin.

- La Nacia Kongreso de Esperanto-France okazos en Liono de la 5-a ĝis la 9-a de majo.

La Universala Kongreso de UEA okazos en Torino de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto.

Por ambaŭ eventoj, ni pensu pri ebla kunveturado.

## Kultura Semajnfino, la 4-an kaj 5-an de februaro

*Aliaj datoj...*

*Alia loko...*

*Alia prezo...*

*Aliaj kursgvidantoj...*

*Kaj tute sukcesa semajnfino  
organizita de nia federacio  
en Domaine de Massacan,  
en La Garde (Var)  
kun 35 partoprenantoj.*



### Marc Richardot

Proksimume tridek homoj el Provenco venis en La Garde por partopreni en semajnfina staĝo proponita de Espéranto-Provence. Je la fino de la staĝo, Renée Triolle, la organizanto, petis ke iu verku raporton pri tiu evento. Ĉar temis pri mia unua staĝo, mi ne povas kompari kun pasintaj staĝoj, sed mi jesis pri la defio kaj provis priskribi nian staĝon...

Dum du jaroj, la vintra kultura semajnfino ne povis esti organizita de Espéranto-Provence. Ĉijare la asocio serĉis novan lokon, kaj trovis Domaine de Massacan, apud Tulono, en La Garde. Tie, la staĝantoj malkovris vastan lokon, kun belega parko apud la marbordo, puraj dormoĉambroj kaj bongustaj manĝaĵoj!

Inter la 9-a kaj la 10-a de la unua tago, Pierre kaj Renée bonvenigis la staĝantojn, disdonis la ĉambrajn ŝlosilojn, proponis varmajn trinkaĵojn kaj prezentis surtable diversajn Esperantajn objektojn aŭ librojn. Ili prezentis ankaŭ niajn staĝinstruontojn: Katalin Kováts kaj Sylvain Lelarge.

Poste, sabate matene kaj posttagmeze, du grupoj sekvis kursojn de Katalin aŭ Sylvain: ne nur pri Esper-

ranto, sed en Esperanto! En mia grupo kun Katalin, ni prilaboris kelkajn etajn sekretojn de samstaĝantoj, ni legis kaj tradukis tre interesan rakonton pri rifuĝintoj el Ukrainio kaj ni ludis pri Esperanta kulturo per la retpaĝoj de Edukado.net.

Vespere, post la vespermanĝo, Sylvain rakontis pri Reĝo Arturo, liaj kavaliroj kaj princino/sorĉistino. Tre interesa kaj instrua historio, kaj por viroj kaj por virinoj! Dimanĉon matene, post la mantenmanĝo, mia grupo trejniĝis por korekti kelkajn gramatikajn erarojn faritajn specife de francparolantoj. Dankon al Katalin pro ŝia kapablo afable klarigi kaj korekti niajn erarojn! Fine, ni lastafoje kaj babileme partoprenis ĝojan manĝadon antaŭ la reveno en niajn hejmojn.

Mi antaŭĝojis veni al la staĝo, mi ĝojis partopreni en ĝi, kaj mi ĝojas memori pri tiu lingvostaĝo. Mi esperas, ke mi povos ofte reveni, ĉar paroli kun realaj kaj amikaj homoj estas pli plezure ol paroli al ni mem aŭ per komputilo!

Dankon al Renée kaj Pierre por la organizo, kaj al Katalin kaj Sylvain por la kursoj.

Ĝis la revido en venonta staĝo!



*kurso kun Katalin*



*kurso kun Sylvain*



*en la manĝejo*



*n.d.l.r.: Ĉar granda parto de la kurso de Katalin temis pri okazintaĵoj rilataj al la milito inter Rusio kaj Ukrainio, unu el la partoprenantoj en tiu kurso, Luc Barbulesco, petis de la gvidanto la eblon legi deklaron pri pacpeto, kiun li verkis, tion aldonante: "ĉar tio estas, laŭ mia kredo, unu el la precipaj valoroj de Esperantujo."*

*Luc petis ankaŭ publikigon de la teksto en nia gazeto.*

*Kompreneble, pri tiu ĉi deklaro respondecas nur ĝia aŭtoro kaj ne la federacio, ĝia gazeto kaj ties redaktoro.*

## Luc Barbulesco

### Deklaro de La Garde

Se oni demandus, kial ni ĉiuj Esperante paroladante hodiaŭ kunvenas, la respondo certe ne malfruos kaj sendube ĝi enhavus mencion de niaj fundamentaj valoroj: amikeco, kunlaboro, internacieco, homara sento, libera esprimo, senmoneco... kaj (finfine, aŭ pli ĝuste unue): pacemo.

Mi volus atentigi ĉiujn ĉeestantojn pri tiu temo, kaj ilin pripensigi pri tio, kio estas okazanta, de kvazaŭ unu jaro, ĉe la koro de la eŭropa hodiaŭa spaco/tempo.

Certe ne temas pri helpi aŭ kondamni unu el tiuj du regnoj, aŭ eĉ ambaŭ (kvankam la ukraina estraro kondamnindas pro sia militemo kaj nerespondeco, preparinte militon de kelkaj jaroj), sed klare kaj forte

proklami nian principan emon je paco, kiel idoj de pluraj eŭropaj generacioj, kiuj spertis la militajn teruraĵojn, ekde la jaro 1914, en la jaro kiam granda Esperanto-kongreso estis okazonta en Parizo, en ĉeesto de Zamenhof... sed estis nuligita, ĉar milita malsano anstataŭis sennaciecan esperon.

Se almenaŭ povus iĝi nia hodiaŭa Esperanto-kunveneto okazo por denove proklami nian pacemon, aŭ prefere pacamon, kaj solene peti ĉesigon de tiu malfeliĉa, malsana kaj maljusta milito!

Cetere, ni disvolvu tiun alian centran valoron: solidarcon kun ĉiu suferanta, kie ajn li troviĝas, kiu ajn estas la kaŭzo!

## El la provencaj asocioj



### 13 - Espéranto-La Ciotat kaj Espéranto-Marseille

## Renée Triolle

### Reĝaj kukoj

En Marseille la 10-an kaj en La Ciotat la 18-an de januaro, anstataŭ la kursoj okazis amika vespero, bona okazo konatigi esperantistojn aŭ lernintojn el diversaj "generacioj".

Mi enkondukis la vesperon citante freŝajn atingiĵojn: venko de Esperanta kanzono ĉe la Eŭrovizia kantkonkurso en minoritataj lingvoj; morto de Pelé, kiu subtenis la internacian lingvon por rilatoj inter sportistoj; uzo de Esperanto ĉe la oficiala pilko por la

monda futbala pokalo en Kataro; oficiala raporto de Eŭropa Unio pri la lingvosocioj: nur 10% de la loĝantoj de Eŭropa Unio parolas la anglan (ĉiuj informoj, nur en la angla, flankenlasas 90% de la loĝantaro, sekvas manko de demokratio).

En La Ciotat okazis la membro-kunveno, antaŭ gustumado de diverstipaj kukoj aŭ trinkaĵoj.

En Marseille, oni kantis "La Esperon" kaj la eŭropan himnon en Esperanto.

### Journée Internationale de la Langue Maternelle

Comme chaque année, Espéranto - La Ciotat a réuni lundi 20 février, au Grand Portique, les amis des langues.

En 1999, l'ONU décide de célébrer les langues maternelles. Sur les 8 000 langues, 43% sont menacées de disparition. Or "chaque langue voit le monde d'une manière différente", comme l'a dit Federico Fellini.

C'est presque une révélation que les langues autochtones sont porteuses d'un savoir ancestral, d'un savoir-faire lié à la nature et que les préserver revient à conserver et transmettre ces savoirs, d'où la Décennie des Langues Autochtones 2023-2033.

J'ai introduit le problème : 40% des habitants de la planète n'ont pas accès à l'enseignement dans une

langue qu'ils parlent ou qu'ils comprennent : imaginez que vous soyez alphabétisés en hongrois !

La Papouasie-Nouvelle Guinée compte 850 langues, l'Indonésie 670, le Nigéria 410, l'Inde 380, le Cameroun 270, l'Australie 250, le Mexique 240, la R.D.Congo 210, le Brésil 210. En fait 3 500 langues, soit 50% des langues du monde, sont parlées dans 9 pays.

Les participants racontent la disparition des langues régionales en France suite à l'école obligatoire en français, ou des anecdotes liées à la langue "secrète" des parents. Des citations de nombreux auteurs (basque, féroïen, napolitain, juif, groenlandais) illustrent le propos : comment concilier l'adaptation au pays accueillant des migrants tout en conservant la langue première ? Comment éviter une hiérarchisation des langues ?

José javier Abasolo, dans son roman "Nul n'est innocent" (ed. L'Atalanta 2000, p.56) fait dire au professeur à propos du basque : "Regardez votre camarade, il se bat comme un chiffonnier et refuse de parler dans la langue de la culture et de la civilisation. Avec son obstination malade à parler un dialecte arriéré et sa prédisposition à la violence, il est l'exemple vivant de ces êtres dévoyés qui ne seront jamais rien dans la vie."



## Pourquoi une Journée Internationale de la Langue Maternelle ?

À l'initiative de l'UNESCO, et en soutien à la Décennie internationale des langues autochtones, l'idée est de rendre à chacun la fierté de sa langue maternelle. 8 000 langues dans le monde, dont deux disparaissent chaque mois.

Comme le dit Caroline Monnet :

***"C'est en parlant nos langues que nous pouvons nous ancrer dans nos identités et la richesses de nos cultures. Les langues autochtones sont les battements de cœur de notre affirmation".***



*Renée T. et quelques participants réunis au Grand Portique, à La Ciotat*

Ce à quoi le frère aîné réagit : "Non seulement tu n'as pas à rougir mais au contraire tu dois te sentir fier." Rappelons qu'il a fallu un décret du roi Juan Carlos 1er pour que le basque, en Euskadi, ait le même statut que le castillan. L'éducation multilingue basée sur la langue maternelle est une nécessité pour transformer l'éducation. La balle est dans le camp des politiques mais aussi des porteurs des langues minoritaires.

Cette soirée amicale s'est déroulée dans la bonne humeur, émaillée par des lectures, des chants, des anecdotes et s'est terminée par le verre de l'amitié.

L'initiative de célébrer une Journée internationale de la langue maternelle vient du Bangladesh. Elle a été approuvée à la Conférence générale de l'UNESCO en 1999 et est observée dans le monde entier depuis 2000.

L'UNESCO croit en l'importance des diversité culturelles et linguistiques pour des sociétés durables. C'est au sein de son mandat pour la paix qu'elle oeuvre pour préserver les différences de cultures et de langues qui favorisent la tolérance et le respect des autres.

À l'occasion de la Journée internationale de la langue maternelle, célébrée chaque année le 21 février, l'UNESCO réaffirme son engagement en faveur de la diversité linguistique et invite ses États membres à célébrer la journée dans autant de langues que possible afin de rappeler que la diversité linguistique et le multilinguisme sont essentiels pour le développement durable.





## 83 - Hyères, Lorgues, Saint-Raphaël

Tiuj tri kluboj de la departemento Var sendis fotografiaĵojn pri siaj kutimaj aranĝoj.



*lingva kafejo en Hyères  
merkredon, la 22-an de februaro*



*lingva kafejo en Lorgues  
ĵaŭdon, la 26-an de januaro*



*membro-kunveno en Saint-Raphaël  
merkredon, la 25-an de januaro*

## Mediteranea Esperanto-Semajno en Les Issambres (83), de la 25-a de februaro ĝis la 4-a de marto



*Marica Bošnjaković, membro de la klubo de Saint-Raphaël, tradukis el la kroata tekston pri MES, kiun Spomenka Štimec, unu el la kursgvidantoj de tiu staĝo, publikigis por KEL, Kroata Esperanto-Ligo.*

MES, Mediteranea Esperanto-Semajno, okazis ĉi-jare la 28-an fojon por ĉirkaŭ cent esperantistoj el Belgio, Hispanio, Kroatio kaj Francio. La ĉefaj organizantoj de ĉi tiu Semajno, Monique Prezioso kaj Christine Graissaguel, investis multe da energio por ke ĉirkaŭ cent esperantistoj plibonigu siajn esperantajn kapablojn en eleganta loĝejo ĉirkaŭita de palmarboj en la Val d'Esquière Les Issambres ĉe la Lazura Marbordo. La kurson de Esperanto por komencantoj gvidis Zsofia Korody, kaj la progresantojn trejnigis Mireille Grosjean.

Spomenka Štimec instruis Esperantan literaturon por 33 partoprenantoj de la seminario kaj prezentis sian libron "Hodler en Mostar" kaj la fenomenon de la Esperanto-tradicio kiel protektatan nematerian heredaĵon de la Respubliko Kroatio. Svitlana Kozarenko faris serion da prelegoj pri la temo Ukrainio. Ankaŭ la franca familio Bošnjaković, devena el Kroatio, partoprenis en ĉi tiu seminario en fama franca regiono, kie floras mimozoj kaj migdalarboj en februaro.



En la reta versio de ĉi tiu gazeto, vi povos legi plian tre kompletan raporton pri MES, brile verkitan de Liba Gabalda.

Al ĝi, kiel kutime, ŝi aldonis tute plaĉan bildprezentadon.

En la venonta numero de LME, "Le Monde de l'espéranto", estos publikigita alia teksto pri MES de Spomenka Štimec, en traduko el la kroata de Marica Bošnjaković.

## Ontaj eventoj pri membroj de nia federacio

- **Bernard Bigonnet** invitas vin al korusa staĝo kun Interkant en la Kastelo Greziljono, de lundo la 24-a ĝis dimanĉo la 30-a de aprilo. Se vi volas kanti trivoĉe (sopranoj, aldoroj, viroj), en agrabla etoso kaj belega loko, petu pliajn informojn ĉe: [https://gresillon.org/spip.php?page=article&id\\_article=266&lang=fr](https://gresillon.org/spip.php?page=article&id_article=266&lang=fr)

- **Bernard Briançon** ekspozicios verkojn siajn en Mouans-Sartoux (06), de la 15-a de aprilo ĝis la 11-a de novembro, pri la temo "Alice au Pays des Merveilles". La verkitoloj estos dulingvaj (fr + eo) kaj ĉi-okaze estos kreita nova parfumo kun Esperanta nomo: "Mirindaĵo".

Jardins du Musée International de la parfumerie - 979 chemin des Gourrettes - 06370 Mouans-Sartoux  
pliajn informojn ĉe:

[https://www.museesdegrasse.com/sites/default/files/2023-03/DP%20BERNARD%20BRIANCON%2C%20ALICE\\_1.pdf](https://www.museesdegrasse.com/sites/default/files/2023-03/DP%20BERNARD%20BRIANCON%2C%20ALICE_1.pdf)

- **Thierry Spanjaard**, prezidanto de Internacia Naturista Organizo Esperantista, invitas vin malkovri la diversajn eventojn proponitajn de INOE, i.a. la Kvaran Verdano Naturisman Semajnon en Greziljono de la 2-a ĝis la 7-a de julio.

pliajn informojn ĉe: <https://gresillon.org/spip.php?rubrique51&lang=fr>

## Nekrologo

La 26-an de februaro 2023 forpasis en sia Marsejla hejmo **Chantal Beaumont**, 76-jara, membro de Espéranto-Marseille kaj de Espéranto-Provence.

Tuj je sia instaligo en Marsejlo, Chantal interesiĝis pri Esperanto. Ŝi regule partoprenis en la mardaj kursoj de Renée Triolle kaj en la ĵaŭdaj konversaciaj kunvenoj.

Tre aktiva, ŝi partoprenis ankaŭ en multaj eventoj, kiel Vivacité en Marsejlo, la Mediteranea Esperanto-Semajno en Les Issambres, kaj kiel naturisto en la okazaĵoj de INOE (Internacia Naturista Organizo Esperantista).



**Espéranto-Provence sincere funebras kaj kondolencas la familianojn kaj geamikojn de Chantal.**



Depuis plusieurs numéros, notre gazette n'a que 8 pages, alors qu'elle en avait souvent 12. Quelques rubriques, comme la page des débutants ou les "ZEO-j", sont donc absentes depuis un certain temps. Pour ne pas faire attendre plus longtemps les lecteurs qui aiment répondre aux questions de la page des débutants, voici les réponses à celles du numéro 129 (été 2022).

<b>Plurelekta demandaro</b> <b>1 - gramatika</b> a: 3 ; b: 2 ; c: 3 <b>2 - vorto-trezora</b> ĉ1: butono ; ĉ2: burĝono ; ĉ3: akno d1: bulteno ; d2: raporto ; d3: balotilo	<b>Solvoj de la demandoj en EP 129 somero 2022</b>	<b>Superzam'</b> 1 c > Tokio ; 2 a > Baghy 3 b > 1960 ; 4 b > 6 5 b > Mi iras al la urbon. 6 b > Groenlando
------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------	------------------------------------------------------------	-------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------

## Note du rédacteur au sujet de la gazette "Espéranto-Provence"

Le numéro 131 que vous avez reçu le 3 janvier n'a pu être envoyé qu'en mars dans sa version papier. Plusieurs raisons à cela : un changement de l'équipe chargée de l'impression, de la mise sous enveloppes et de l'envoi... des règles de plus en plus draconiennes imposées par La Poste (une d'entre elles, pour illustrer mon propos : obligation d'envoyer les enveloppes uniquement dans les départements limitrophes du département d'envoi ; comment envoyer alors à L'île Rousse en Corse ou à Gap dans les Hautes-Alpes, par exemple ?) Et cette autre règle : envoyer la gazette à plus de 100 destinataires pour bénéficier d'un tarif préférentiel. Cela explique que reçoivent aussi la version papier ceux qui nous ont bien indiqué ne vouloir que la version numérique. Mais tout cela va changer - peut-être - à partir du numéro 133 de juillet. À suivre, donc...



## À noter sur votre agenda

### dans notre fédération

#### 1er jeudi de chaque mois - 18 h - Marseille (13)

Café linguistique espéranto

**Attention ! changement de lieu !**

La Passerelle - bar à vins / planète livres

26 rue des Trois Mages, tout près du Cours Julien et de la Plaine (place Jean Jaurès) à Marseille 6ème.

infos : *Thierry Spanjaard - 06 09 18 28 51*

#### dernier mercredi de chaque mois - 18 h - Hyères (83)

Café linguistique espéranto

bar de l'hôtel Ibis-Gare

45 rue Edith Cavell (face à la gare)

infos : *Pascal Vilain - 06 42 19 68 51*

#### dernier jeudi de chaque mois - 17 h - Lorgues (83)

Café linguistique espéranto

bar-resto « Carnets de Voyage »

12 avenue Allongue

(rue qui descend en face de la mairie)

infos : *Jean-François Cousineau*

04 94 47 99 45 / 06 82 53 52 02

(laissez un message)

### en France

#### mai 6-8 - Lyon (69)

Congrès interassociatif de l'espéranto en France.

+ un jour d'après-congrès le 9 mai à Saint-Étienne

<https://esperantolyon.org/>

#### Baugé (49) - Château de Grésillon

riches programmes de printemps et d'été

<http://gresillon.org/?lang=fr>

#### Bouresse (86) - Kvinpetalo - Esperanto-Centro

plusieurs stages en 2023

<http://www.kvinpetalo.org/spip.php?rubrique18>

#### juillet 29/août 1 - Baugé (49) - Grésillon

96ème congrès de SAT

<https://www.satesperanto.org/spip.php?article5076>

### en Europe

#### juillet 29 / août 5 - Turin (Italie)

108ème Congrès universel d'espéranto

<https://www.esperanto.it/torino2023/>

#### août 5-12 - Lignano Sabbiadoro (Italie)

Congrès internationaux de ILEI et de TEJO (IJK)





# Mediterranea Esperanto-Semajno



**Klara Zamenhof**

- Klara Zamenhof (nask. Silberraj)
- 1863 - 1924
- La dotro de Klara Silberraj edigis la pensadon de la unua libro de "Internacia Lingvo" Varsovio 1887

**Virinoj en la Esperanta literaturo**

Eli Urbanová 1922 - 2011

- Ĉefino.
- Poetino.
- Poemaroj:
  - "Sur en kulonoj"
  - "El sabaj festoj"
  - "Hespero dancoj"



**DISPARITION DES ABEILLES, LA FIN D'UN MYSTERE**

#Film  
Diplomito  
Estrelinas avec la république  
Espace Editions l'Esperantiste



2023



## La Mediteranea Esperanto-Semajno en "Les Issambres"

25.2.2023 – 4.3.2023

MES estas printempa unusemajna renkontiĝo de esperantistoj en suda Francio en agrabla loko ĉe la Mediteranea maro. Tie ni loĝis en bela hotela restadejo *Val d'Esquièrre*, antaŭe palaco en la tridekaj jaroj, kaj nun nomata "*Village Club Miléade*". La hotelo kaj la parko estas bone prizorgataj, la personaro estas agrabla. Ĝi estis renovigita, aldoniĝis kelkaj novaj instalaĵoj, ekstera naĝejo, tenisejoj, "Spa"-centro por homa bonfarto (natura kosmetiko, masaĝoj, magnetismo, banoj).

Ĉi-foje kolektiĝis 90 partoprenantoj el naŭ landoj por kune ĝui kursojn, diversajn prelegojn, posttagmezajn promenojn, ekskursajn vojaĝojn, vesperajn distraĵojn. Inter ni estis ukraina familio: patrino kun du ĉarmaj geinfanoj, rifuĝintoj gastantaj ĉe franca familio loĝanta en Parizo.

Ĉe la alveno, la nova hotelestro bonvenigis nin en la franca lingvo kaj bondeziris al ni agrablan restadon. Li ankaŭ prezentis al ni la ĉefprizorganton de la kuirejo kaj animantimon de la hotelaj aktivaĵoj. Andreo Grossmann brile tradukis lian paroladon. Poste ni tostis per aperitivo, interkoniĝis kun novaj partoprenantoj kaj gaje dancis farandolon. Ĝi estas provenca ritma viveca ĉendanco, dum kiu la dancantoj manenmane serpentumas inter la publiko. Mi transdonis salutojn al la partoprenantoj de Rosa Lopéz kaj Sol kun Francisc kiuj ne povis ĉeesti la aranĝon. Christine prezentis la semajnan programon kaj la tri instruistinoj nelonge parolis pri instru-metodoj en siaj respektivaj kursoj.

Dum la tuta semajno okazis instruado de Esperanto en tri kursniveletoj: la 1-a por komencantaj parolantoj estis gvidata de Zsófia Kóródy, la 2-a por progresantoj gvidata de Mireille Grosjean, la 3-a pri literaturo gvidata de Spomenka Štimec. Dimanĉon la 26-an de februaro okazis kunveno de la ĝenerala asembleo de Esperanto-Provence. Antaŭ la posttagmezaj kursoj, Svitlana el Ukrainio rakontis pri sia lando, konigis nin pri la historio, kulturo, folkloro, lingvo kaj pri aktualaj okazaĵoj en la nuntempe okupata lando.

Dimanĉe antaŭ la tagmanĝo ni fotiĝis por la ĵurnalo *Var-Matin*, en kiu poste estis aperigita artikolo pri nia staĝo, akompanata per la komuna foto. Post la tagmanĝoj estis libera tempo por promenado en la naturo aŭ por partopreni posttagmezajn ekskursojn al vizitindaj lokoj. Estis proponataj vizitoj al *San Peire*, lagetoj de *Villepey*, klostro en *Fréjus*, muzeo en *Saint-Raphaël*. Interesaj estis la vizitoj de abelejo en *Esterel*, de la muzeo de la fera Masko kaj de Reĝa Fortikaĵo en la insulo *St. Marguerite*. Ankaŭ la hotelo proponis aktivaĵojn en kiuj ni povis partopreni. Luj preferis kartludi, triki, prilabori broĉojn aŭ tutsimple babili. Carmen, per sia nekutima brodita vestaĵo, propagandis Esperanton per simplaj frazoj. Dum la kafo-paŭzo eblis salteti super la longa turnanta ŝnuro aŭ rigardi foto-albumojn pri pasintaj renkontiĝoj en *Les Issambres*.

Vespere, kiel kutime, okazis diversaj prelegoj. La unuan vesperon Mireille Grosjean prezentis diversajn stilojn de arkitektoj. "Arto, lingvo - ĉu paraleloj eblas?" En la lunda vespero ni spektis filmon pri abeloj kaj Philippe Chavignon rakontis pri bredado de abeloj pri kio li estas fakulo. La postan tagon ni vizitis liajn abelujojn en la naturo kaj povis aĉeti mielon. La sekvantan vesperon, Spomenka Štimec parolis pri la ĉeĥa juddevena kaj denaska esperantista knabo Petr Ginz, kiu famiĝis pri sia desegnaĵo

de "La Tero vidata de sur la Luno", kiu aperis ankaŭ sur ĉeĥa poŝtmarko. Merkrede, post la vizito al Margarita insulo, kiun la organizantoj donacis al ni senpage, Hannes Larsson prezentis sian libron pri dulingva (angla kaj franca) krimromano, en kiu Esperanto ludas rolon por propagandi ĝin al la publiko. Ĵaŭde vespere, Mireille kaj Spomenka parolis pri Hektor Hodler kaj pri lia patro, fama pentristo.

Dum la lasta vespero okazis loterio en kiu ĉiu gajnis ion. La vespero estis dediĉita al prezentaĵoj de diversaj kantoj, skeĉoj kiujn la partoprenantoj mem pretigis. Aperis plurlingva sceno de vulpo kaj korvo, tri friponoj, fiŝvendisto, problemo kun lavmaŝino ktp. La plej amuza estis sceno pri ebrulo inspirata de la poemo de William Auld: "Ebrio". Ĉe la fino prezentiĝis la ĥoruso de Bernard Bigonnet. Sekvis dankoj al la organizantoj kaj al la instruistoj. Muziko de saksofonoj kaj akordionoj dancigis la partoprenantojn ĝis la noktomezo.

Sabate matene jam pluraj samideanoj adiaŭis nin kaj revenis al siaj hejmoj. Tamen daŭris la kurso de Spomenka, kaj en la apuda salono Nina el Rusio prezentis al ni rusajn pentristojn: Vassily Kandinsky, Kasimir Maleviĉ, Marc Chagall kaj Konstantin Vasiljev.

Jam la 15-an fojon la Esperanto-grupo de St. Rafael kaj Freĵus, sub la gvido de Monique Prezioso kaj Christine Graissaguel kun pliaj helpantoj, organizis MES, laŭdire la lastan. Tamen estas espero, ke novaj organizantoj transprenos la taskon por daŭrigi la printempan tradicion de tiuj agrablaj semajnoj.

Dankon al ĉiuj kontribuintoj en la aranĝo, pri kiu ĉiuj estis kontentaj kaj strebis al la progreso de sia lingvonivelo. Ni ricevis multajn valorajn informojn pri Esperanto-kulturo. Speciala danko ricevu la tuta familio de Monique Prezioso, kiu multe helpis en la organizado kaj dum la aranĝo mem.

*Liba Gabalda*